

NORDFRANCA

ESPERANTISTO

(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAŬEN)



MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj

Publikigas la sciigojn de la Norda Federacio
kaj de la Grupoj

REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France

Publie les renseignements
de la Fédération du Nord et des Groupes



Redaktejo kaj administrejo : 33, rue Marceau
ROSENDAEL - LEZ - DUNKERQUE (Nord)

C. VERNAY, Direktoro

G. VANHOVE, Administranto

M. DELAVIGNE, Respondeca redaktoro

Redakta Komitato, redaktas

Jarabono : Francujo 10 frankoj

aliaj landoj : 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro

POŬTĈEKKONTO : LILLE 403-50

**Les bonnes adresses
de Dunkerque :**

A L'IMPECCABLE

VÊTEMENTS

5, Place Jean-Bart - DUNKERQUE
...l'ami des Espérantistes



Le "Café du Centre"

39, Place Jean-Bart, DUNKERQUE

...réserve le meilleur accueil
aux Espérantistes

Ejo de la sabotaj Kunvenoj de la grupo
(18-30 / 20-30)

Esperanto parolata

Les bonnes adresses d'AMIENS...

**Pharmacie Centrale
Saint-Leu**

R. DESCAMPS

Pharmacien de 1^{re} classe

59-61, Rue Saint-Leu - AMIENS
(face l'Eglise) Tél. 22-88

**Manufacture de Vêtements
A FAÇON**
pour Hommes, Jeunes Gens, Enfants

M. CHANTRIAUX & F. LABONNE

S. à R. L. Capital 40.000 fr.

34, Rue de l'Amiral-Lejeune
AMIENS



La plej bonaj JUVELOJ
Pos-, Sonoril-, kaj Vekhorloĝoj
por plej malaltaj prezoj

"AU BEFFROI"

A. HERVIEU

24, rue des Chaudronniers - - AMIENS

OPTIQUE MÉDICALE

G. GUIBERT

Opticien - Lunetier

33, Rue Allart - AMIENS

Téléph. 15-67

ESPERANTISTE

Les Bières "LE COQ BLANC" sont les plus réputées dans la région

NORDFRANCA ESPERANTISTO

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj

PROPAGANDO ★ INSTRUADO ★ AKTUALAĴO ★ LITERATURO
PROPAGANDE ★ ENSEIGNEMENT ★ ACTUALITÉ ★ LITTÉRATURE

Kopirajto de la enhavo rezervita. Manuskriptojn kaj scilgojn oni devas sendi nur al tiu-ĉi adreso : C. VERNAY, MALO-LES-BAINS (Nord). Ni ne resendadas la manuskriptojn. — La Redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn. — *Les auteurs sont seuls responsables de leurs articles.*

Niaj Pioniroj...

ALFRED MICHAUX

Nous publions ci-dessous le bel article dédié à l'œuvre de M. Michaux par un de nos collaborateurs boulonnais, que nous remercions, article que celui-ci avait écrit avant le décès de M^e Michaux, en hommage au talentueux défenseur de l'idée si noble et généreuse renfermée dans l'idéal espérantiste.

Michaux n'est plus. Il s'est éteint le 27 mars dernier à Boulogne-sur-Mer, à l'âge de 78 ans, en plein travail. Son souvenir restera vivant dans le cœur et dans l'esprit de tous les espérantistes.

Nordfranca Esperantisto, qui fut le premier dans la presse espérantiste à annoncer son décès, tient à dire, ici, toute l'admiration que nous éprouvons pour l'œuvre admirable et magnifique du grand pionnier que nous pleurons et qui

fut une des gloires les plus pures du mouvement espérantiste d'avant-guerre. — C. V.

La nomo de MICHAUX montras daton, gloran daton en la historio de Esperanto. Ni estas en 1905, la jaro de la Bulona Kongreso, la Unua Internacia Kongreso de Esperanto. Oni memoru pri la skeptikeco, la indiferenteco kaj eĉ, kelkfoje, la malamikeco kiujn, dum tiu epoko, renkontis la esperantista movado.

Nu, la Unua Kongreso triumfe refutis ĉiujn kontraŭdiraĵojn kaj elmontris ke la verko de Zamenhof bonege plenumis la celon por kiu ĝi estis kreita : lingvo internacia tiel parol-ebla kiel skribebla. Bonege aranĝata, tiu kongreso havis mirindan sukceson kaj donis viglan impulson al nia movado. Verdire ĝi estis la verko de Michaux, helpata cetere de sindonemaj kunlaborantoj kuraĝigataj per lia apostola kredo.

Tagoj neforgeseblaj dum kiuj la diversaj laborkunvenoj kaj ekskursoj okazis en plena entuziasmo, sub prezidanteco de nia respektinda Majstro, Doktoro L.-L. Zamenhof, tiom bona kaj simpla.

Unu el la plej grandaj meritoj de Michaux estis tiu-ĉi : li sukcesis decidi Zamenhof, tiun modestan scienculon, malamikon de bruo kaj reklamo, alveturi Bulonjon. Li ne havis kutimon vojaĝi, diris li, kaj neniam publike parolis. Longe li bezitis kaj fine



S^{ro} Alfred MICHAUX

(Cliché Le Télégramme)

konsentia. « Mi nepre venos » skribis li. Li venis kaj... estis la sukceso.

Michaux naskiĝis la 5^o de Junio 1859, en Clencieu, distrikto de Hucqueliens (departemento Pas-de-Calais). Li enskribiĝis kiel advokato en 1885 kaj okupis plurfoje la honoran postenon de advokatestro. Li prezidis la komitaton por la juĝotaj infanoj. Tre sportema, li estis longtempe delegito de « Touring-Club de France ».

Libro pri « Neo-Latin », de Courtonne, inapiris al li liajn unuajn lingvajn laborojn. Esperanton konigis al li de Beaufront. Tuj li estis allogata de la logikeco kaj mirinda simpleco de tiu lingvo kaj li konigis ĝin per publikaj paroladoj kiujn ĉrestis granda aŭskultantaro, ĉarmata de lia flama bildoriĉa parolado. Li gvidis multajn publikajn senpagajn kursojn kaj verkis plurajn lernolibrojn (unu kun P. Boulet).

Esperantista ekskurso organizita de Michaux, okazis la 7^o de Aŭgusto 1904 al Calais kaj Douvres (Anglujo). Ĉirkaŭ 120 personoj partoprenis ĝin, inter ili kelkaj angloj kaj 2 ĉeĥaj inĝenieroj. Tio estis kvazaŭ skizo de la Unua Kongreso kaj estas dum unu el tiuj kunvenoj ke Michaux proponis aranĝi Internacian Kongreson Esperantistan, la sekvantan jaron.

Ni ne insistas pri la sukceso de tiu kongreso al kiu aliĝis pli ol mil partoprenantoj inter kiuj multaj alvenis de tre malproksimaj landoj, kiel Kanada kaj Kalkazo (Rusujo).

De post tiu epoko, Michaux daŭrigis kaj daŭrigas ankoraŭ nune montri sia kiel unu el la plej fervoraj kaj agemaj propagandistoj de Esperanto. Multnombraj paroladoj estis de li farataj en Francujo kaj en najbaraj landoj : Britujo, Belgujo, Nederlando, k. t. p. Li publikigis ankaŭ pri la internacia lingvo kvanton da gazetaj artikoloj kaj plurajn broŝurojn : *Libera Evoluo* aŭ *Akademio* ; *Catéchisme de l'Esperanto* ; *Nouvelle méthode pour apprendre seul l'Esperanto* (en kunlaborado kun P. Boulet) ; *Le Romanal* (internacia lingvo, bazita sur la latina, je la uzado de la obstinegaj latinpartianoj, por, iom post iom, alvenigi ilin al Esperanto).

De post tiu epoko, Michaux estas ano de la Lingva Komitato, Prezidanto de la Internacia Societo de Juristoj Esperantistaj, Honora Prezidanto de la Bulonja Esperanto-Grupo, k. t. p.

Fizike : viro granda, kun bluj esprimo-plenaj okuloj. Lia parolo estas flama, simpatia kaj arda, samtempe simpla ; kaj tio klarigas la sukceson de liaj pledadoj kaj paroladoj. Lia akcepto estas ĉiam afabla kaj amika.

Morale : Karaktero. Decas diri lian grandan sinforĝesemon. Neniam li klopodis por havigi al si personan profiton de la Esperant-

ismo. Spite de multaj malfeliĉaĵoj (longa malsano, kruelaj familiaj funebroj) lia ĉerho restas juna kaj agema. Li estas antaŭ ĉio laboremulo. Lia longa sperto, lia enciklopedia klereco kaj lia praktika juĝokapablo faras ke oni ĉiam povas profite prikonsiligi kun li en la plej malfacilaj aferoj. Liaj opinioj estas ofte petataj kaj sekvataj.

Esperanto multe ŝuldas al Michaux.

G. B.

★

Por fini, ni ne povas pli bone fari ol reskribi ĉi-tie parton de artikolo kiu aperis en *Le Journal des Débats* de la 16^a de Aŭgusto 1905, sub la titolo « La Doktoro Esperanto », kaj kies aŭtoro estas Raoul Fabens :

« S-ro Michaux, kies kabineto troviĝas en unu el la plej gajigaj partoj de « Bulonjo-la-Griza », estas advokato tre okupata. Sed kvankam tiom okupata, S-ro Michaux havas ĉiam iom da tempo dediĉota al Esperanto kies profeto li fariĝis inter siaj samurbanoj. Li gvidas la paŝojn de la Esperantista Grupo de Bulonjo, li semas la novan parolon ĉirkaŭ li, entuziasmo superfluas de li kaj lia kredo ekflamigas eĉ la komercistojn...

« Ne estas ĉio. Tio estas nenio. S-ro Michaux faris miraklon multe pli gravegan. Li kunvenigis Internacian Kongreson kies ĉiuj membroj sin komprenas. Ĉar al lia iniciativo, al lia agemo, la Esperantistaro ŝuldas la kongreson, kies laboroj nune finiĝas en Bulonjo kaj kiuj permesis al la adeptoj de la nova helplingvo, jam multnombraj en ĉiuj partoj de Eŭropo, kunveni por interparoli pri sia sama pasio, per sia sama lingvo.

« Sur alia marbordo ol Bulonjo, je la sama horo, diverslandaj homoj diskutadas la plej gravajn aferojn de siaj respektivaj patrolandoj. Kaj jen, laŭ la gazetoj, klamanriere tio okazas : « *S-ro Witte sin esprimas ruse kaj liaj paroloj estas tradukataj anglan pere de S-ro M. Nubaukoff. Barono Ko-mura uzas la japanan lingvon kaj S-ro Adalci tradukas francan.* » Do, kvar lingvoj por ebligi ke du plenrajtigitoj konversaci kaj sin komprenu, Dio scias kiel ! Kia koincido por Esperanto kaj kia sukceso por S-ro Michaux ! Estas tia brita demonstraĵo pri la utilo de helplingvo komuna por ĉiuj popoloj, je la sama momento kiam la Kongreso de Bulonjo altiras la atenton de la civilizitaj individuoj, al kiuj, en tiu sezono, la aŭtomobila kaj alpinisma sportoj lasas ankoraŭ iom da tempo por tralegi la gazetojn.



SINJORO ADVOKATO
Alfred MICHAUX

organizinto de la unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer (Francujo)

Aŭgusto 1905

Nia glora majstro

SINJORO DOKTORO
Ludoviko ZAMENHOF

(15-12-1859 — 14-6-1917)

liu donis al la homaro la miraklan lingvon, kiu 1001-fermas la tutan mondun

Sed la triumfo de Michaux, lia gloro, estas havi la talenton ekvidigi al la Esperantistoj ilian dion. Li sukcesis venigi el lia malproksima Polujo la misteran kreinton de la nova lingvo, tiun mirindan D-ron Esperanto, kies verko jam estis konata kaj respektigata antaŭ ol lia portreto aŭ nur lia vera nomo estis publikigitaj de la gazetoj. Pli bone, S-ro Michaux gastigas en sia domo Doktoron Zamenhof, en karno kaj ostoj, akompanatan de S-ino Zamenhof, ĉirkonstanco kiu faras veran homon el la legenda kaj metafora Doktoro Zamenhof.

« Malgranda viro eniris kaj Doktoro Zamenhof afable premis mian manon. Li diris « estu preta respondi miajn demandojn », se almenaŭ mi bonvolus paroli malrapide, ĉar neniam vojaĝinte en Francujo li ne havis

kutimon paroli la francan lingvon, kion li studis ĉefe je la vidpunkto de la kreado de Esperanto. Tio estis nur modesteco. La « Doktoro » sin esprimas en nia lingvo iom hezite, sed perfekte. Nij gramatikaj subjunktivoj ŝajnas ne havi sekret-ojn por li. Tamen, kiam mi diris al li mian deziron havi de li informojn pri lia persono, S-ro Zamenhof jetis al mi kaj al S-ro Michaux kvazaŭ malkvietajn rigardojn. Sen la fervoro de la komplezema advokato preskaŭ certe estas ke mi ne povus sciigi al vi aliajn detalojn pri tiu timema inventisto ol tiuj, kiujn miaj okuloj montris al mi.

Esperanto havas sian flagon, verdan kompreneble, kun verda stelo en angulo, meze de blanka kvadrato.

Tiu unua kunveno de Esperantistoj apartenantaj al ĉiuj rasoj kaj al ĉiuj lingvoj sur la tergloblo forigis la dubon kaj disŝiris la necertecon konsideratajn kiel la lastajn barojn al la definitiva aliĝo de ĉiuj saĝaj homoj.

La Kongreso de Bulonjo nuligis ĉiujn kontraŭdiraĵojn.

R. F.

★

Jen la funebra parolado dirita de S-ro Deligny, Honora Prezidanto de Norda Federacio Esperantista, ĉe la tombo de Michaux, la 31^o de Marto :

« Funebros la tuta Esperantistaro. S-ro Michaux mortis. Unu el la plej malnovaj kaj plej agemaj pioniroj de nia kara ideo forlasis nin : la organizinto de la Unua Universala Kongreso de Esperanto, malaperis por ĉiam el nia rondo. Granda perdo, granda doloro por ni.

Nia amiko konatiĝis kun Esperanto en 1900 kaj estis tuj entuziasmigita de ĝia bela idealo de interkompreniĝo kaj interfratiĝo. Li tuj starigis en sia urbo grupon, kreis kurson, verkis metodon kaj komencis viglan propagandon ne nur en nia lando sed ankaŭ en

Belgajo, Nederlando kaj Britujo, kie li faris multajn paroladojn.

Dum la internacia kuniĝo de Calais, en 1904, li proponis ke la unua universala kongreso okazu en Boulogne. Li tuj poste invitis Doktoron Zamenhof kaj lin gastigis dum tiu grandioza festo. Ĉu mi vere bezonas rememorigi ĉi-tie la sukceson de tiu kongreso, kiu konservis la nomon « neforges-ebla »? Pluraj centoj da samideanoj, venintaj el ĉiuj partoj de la mondo povis, la unuan fojon en la historio de la tero, sin kompreni kaj interfratiĝi. Tiam pravigis la vortoj de la majstro: « En la mondon venis nova sento. » Al tiu sento S-ro Michaux restis fidela ĝis la morto; li estis ankoraŭ prezidanto de la Juristoj esperantistaj. Lia memoro restos eterne en nia koro. Bonvolu lia familio trovi en nia simpatio konsolon al sia doloro. S-ro Michaux, vi perlaboris gravan, longan kaj sukcesan taskon; ripozu pace... Adiaŭ!

★

De S-ro Sip. Stuit, nia simpatia kaj tiel sidonema kunlaboranto kin nun instruas nian lingvon en Belgujo, ni ricevis la suban kortuŝan leteron:

« Jes, mortis unu el la plej noblaj homoj. Michaux estis belanima homo. Kaj kiom multe li faris! Ĉu ni ne hontu, ni, kiuj foje plendas. Nun, kiam estas preskaŭ nur rikolti la fruktojn.

« Mi konfesas, ke min tre tuŝis la sciigo pri lia morto. Car dum mia restado en Boulonjo ni interparolis fojfoje. De li persone mi ricevis tiun ununuran kliŝon kaj de tiam ni eldonas la poŝtkarton... »

La kliŝon montrantan Michaux apud Zamenhof kaj kiun ni publikigas en tiu-ĉi numero, tre afable havigis al ni nia nederlanda samideano Sip. Stuit, kiun ni tutkore dankas.

Compétition-Exposition Internationale de Photographies d'Amateurs de Calais

Nous avons le plaisir de rappeler à nos abonnés que "L'Activité Intellectuelle du Calaisais" organise une Compétition du 15 Janvier au 15 Septembre 1937, exclusivement réservée aux amateurs photographes français et étrangers. Cette compétition sera suivie d'une grande Exposition en octobre 1937, à Calais.

Des prix spéciaux seront décernés aux exposants esperantistes.

Demandez réglemment à M. G. Masson, président, 96, rue Hermant, Calais.

Cours de Vacances à Malo-les-Bains

sous le Patronage de la Société Française de Propagation de l'Espéranto,
Cours pour débutants, Cours de perfectionnement

Pourquoi ? *Pour se perfectionner en espéranto, pour connaître d'autres « samideanoj » et enfin pour vivre dans une ambiance espérantiste.*

Par qui ? *Par un jeune et sympathique professeur hollandais, M. Henk Thien. Des cours clairs et précis donnés avec enjouement et de très intéressantes causeries faites sur son pays ont fait apprécier la valeur de M. Thien qui a enseigné pendant tout un hiver dans notre région.*

Où ? *Dans une pension de famille confortable, située sur la digue même, donc face à la mer, et dirigée par de ferventes espérantistes. Des « samideanoj » étrangers y séjournent fréquemment et M. Thien y passera une grande partie de l'été.*

Quand ? *Du 19 au 31 juillet et du 17 au 31 août pour les personnes empêchées de se rendre libres en juillet. Il sera possible aux « samideanoj » ne pouvant disposer de deux semaines d'y prendre cependant part et avec grand profit quelle que soit la durée du séjour.*

Cours de Vacances ? *Oui! de vacances, car seulement une partie de chaque matinée sera réservée aux cours. L'après-midi il y aura des promenades et des excursions (auxquelles le professeur prendra part); le soir: des fêtes, sauteries et réunions avec les membres du groupe espérantiste de Dunkerque, et tout cela dans une atmosphère de gaieté franche et animée.*

Conditions ? *Cours et pension complète (y compris boisson, service et taxe): 35 fr. en juillet, et 42 fr. en août, par jour et par personne.*

Pour tous renseignements, écrire à: M. Houzé, ingénieur, secrétaire du Groupe Espérantiste de Dunkerque-Malo, 121, rue G.-Neuts, à Malo-les-Bains (Nord); ou à Mme Pessey, Pension Eole, 158, digue de Mer, à Malo-les-Bains (Nord). Tel. 13.25.

RADIO

Petu de S-ro Maurice Nogé, 21, rue Maréchal-Joffre, à Dunkerque (Nord) programon pri esperantlingvaj disendoj.

ĈIAM KAJ ĈIE PORTU LA VERDAN STELON



Ni! la Komencantoj!

— Se vi estos BON/KONDUTA, filineto, ni iros promeni. La vetero estas belega. Estas varme. Printempo ja dorlotas nin.

— Jes, patro, ni ŜIR/KOLEKTOS floretojn. En la arbaro ni havos multajn.



— Nu, panjo estas preta. Rapidu! Prenu viajn skarpajn ĉar vespere la vetero eble MAL/VARM/IĜOS!

— Vidu, kiel la arboj jam RE/VERD/IĜAS! Kiel la folioj estas delikate verdaj! Kiel ili elegante MAL/FALDAS sin! Jen ARBETO/BAR/ILO tute blanka.

— Kiel NOM/IĜAS tiu arbeto?

— Ĝi estas KRATAGO. Malantaŭe ETEND/IĜAS bela herbejo. Rivereto glitas sub POPLOJ kun gajiga murmureto. Bovino, milda kaj pacema, PAŜT/IĜAS kaj REMAĈ-AS en la herbejo. Du pintaj kornoj superpasas ĝian kapon, ornamente per du HAR/PLENAJ oreloj. Ĝia bovido avida MAM/SUCAS.

— Ĝi estas bonŝanca, ĝi ricevas freŝan lakton!

— Jes certe. Vidu pli malproksime apud la farmodomo, la porkon; ĝi tre ŝatas akvon kaj barmraktas en la ŜLIM/AKV/EJO...



— Jen, ni estas en la arbaro! Antaŭ unu monato la tero estis tute kovrita per anemonoj kaj sovaĝaj PRIMOLOJ. Hodiaŭ ili estas for... velkitaj! Restas ankaŭ violoj, sed nun amase floras KONVALOJ, MIOZOTOJ, VINKOJ, k.t.p.

— Ni serĉu konvalojn!

— Volonte. Ĉi-tie, vidu, ili estas multenombraj! La malgrandaj kloŝetoj ek/aperas inter la brilaj kaj verdaj folioj. Kiel ili bonodoras!

— Nun, ni sidu, filineto! Manĝu vian buterpanon kaj DUME mi rakontos historieton, kiun mi legis en *Esperanto Internacia*:

Kampulo MAL/LAŬDIS sian serviston: MAL/LABOR/EM/ULO! li diris. Vi kuŝas tie sub arbo anstataŭ labori! Vi ne estas inda, ke la suno vin SUB/BRILU!

— Ĝuste tion mi volis eviti, respondista servisto, kaj tial mi kuŝigis min en la ombron.

Ĝis revido!

Provizora
KATO



KLARIGOJ

BONKONDUTA: sage (konduiti; se conduire); ŜIRKOLEKTI: cueillir; SKARPO: écharpe; MALVARMIGI: iĝi malvarma (se refroidir); REVERDIGI: iĝi denove verda; ARBETOBARILO: barrière d'arbustes (haie); NOMIGI: se nommer; KRATAGO: aubépine; POPLO: peuplier; PAŜTIGI: paître; REMAĈI: ruminer; ŜLIMAKVEJO: mare; PRIMOLO: primevère; KONVALO: muguet; MIOZOTO: myosotis; VINKO: pervenche; DUME: pendant ce temps.

★ 18^a Nordfederacia Kongreso ★

« Ni estas feliĉaj, ĉar ni baldaŭ akceptos niajn amikojn. »

AMIENSA GRUPO.

★

Ĉar la 18^a Federacia Kongreso devas okazi en Amiens la 1^{an} kaj 2^{an} de Majo 1937 mi opinias ke estas mia devo atentigi tiu-okaze la estontajn kongresanojn pri la sindono kaj meritoj de la prezidantino de Esperantista grupo de Amiens, F-ino Alice COLLÉATTE.

Lernantino kaj kunlaborantino de F-ino Desmarest, kiu lasis neforgeseblajn rememorojn al la Esp. Movado, F-ino Colléatte sekvas ŝin daŭrigis la plivastigon de la loka grupo, dank'al ŝia persistemo kaj siaj senĉesaj klopodoj.

Ni devas rememorigi la daton de 8^a de Januaro 1903 kiam unufoje oni starigis la demandon pri Esperanto en Amiens. Tio okazis antaŭ 34 jaroj. En tiu epoko oni parolis pri prelego okazanta baldaŭ ĉe la Industria Societo. Efektive la prelego de S-ro Cart, eminenta profesoro pri vivantaj lingvoj ĉe Sorbono kaj universitata agregaciulo, okazis la 12^{an} de Januaro. Kun granda aŭtoritato, profesoro Cart elmontris la avantaĝojn de la helplingvo por la loka komerco, k. t. p.

La unua leciono de la kurso okazis la 29^{an} de Januaro kaj de tiam la ĉiujare gvidataj kursoj estis vizitataj kun pli-malpli grava sukceso. Sed la milito, kiu faris multnombrajn viktimojn inter la plej influhavaj membroj kontribuis al la forgeso pri Esperanto. Oni devas rememori ke, en tiu epoko, unu el la plej viglaj profesoroj kaj samtempe prezidanto de la Esperantista grupo, S-ro Queste, estis inter la viktimoj. Estas tre malĝoja rememoro por tiuj kiuj, same kiel mi, konis tiun priordan pasintecon.

Pli poste, feliĉe por nia Movado, la sindona laboro de F-ino Desmarest kiun helpis F-ino Colléatte donis novan puŝon al la propagando.

Mi estas feliĉa verki tiun-ĉi artikolon je la honoro de la pionirinoj de nia Movado.

Ankaŭ mi plej sincere bondeziras ke la Kongreso en Amiens plene sukcesu, kaj tiunmaniere rekompensu la klopodojn de nia simpatia kaj sindona Prezidantino, kiu rajtas ricevi niajn plej sincerajn laŭdojn.

Ch. TASSENCOURT.



AMIENS - La Nef de la Cathédrale

(Cliché Syndicat d'Initiative d'Amiens)

★

PROGRAMME

SAMEDI 1^{or} MAI

14 heures. Examens de la S. F. P. E. (Hôtel de Ville).

20 h. 30. Réunion amicale (Hôtel Bellevue).

DIMANCHE 2 MAI

9 heures. Concours « Fervorigilo » (Hôtel de Ville).

9 h. 30. Hommage à Jules Verne, premier président d'honneur du Groupe Esp.

10 heures. Assemblée générale (Hôtel de Ville).

12 heures. Photographie. Visite de la Cathédrale.

13 heures. Au « Royal », Banquet sous la présidence de M. le Maire d'Amiens.

15 h. 30. Matinée récréative (Concert suivi de Sauterie), Salle des fêtes de l'école de garçons de Saint-Jacques, 55, rue des Capucins).



Voir la liste des adhésions page 10.

La Vizito ĉe la Stando en la Komerca Foiro de la Federaciaj Esperantistoj aŭ HISTORIETOJ PRI PAPERĜOJ

Ĉar ne estis kunveno, matenon de tiu dimanĉo, nur kvardek partoprenis la komunan tagmanĝon en « Foyer Lillois », Douai, Auzin, Dunkerque kaj aliaj urboj estis reprezentataj inter la Lille-anoj.

Modesta sed bona manĝo sufiĉis al la geesperantistoj, kiuj ĝenerale sin nutras per Esperanto, tio estas per verdaĵo.

Al la partoprenantoj estis agrable posedi S-ron Waringhien, niajn geparolantojn de Radio P.T.T. Nord, kaj ankaŭ la ĝojan Verdán Nazon! Tie ĉi komencas historietoj pri paperĝoj. Ruĝa floro « F-ino Mikro » ekstaras sur sian seĝon por transdoni korajn salutojn de germanaj kamaradoj, kiuj ŝi vizitis la nunan monaton: ŝi pasigas poŝtkartojn sur kiujn oni skribas agrablajn pli malpli ŝercajn. Dum ŝi parolas, delikate ŝoviĝas ŝiaj ŝuoj, el sub ŝiaj piedoj, kaj la ruĝa fraŭlino ŝanceliĝas plore. Tamen ŝi baldaŭ resereniĝas, ĉar, sendube pere de la sama mistera mano (ĉu Kurnela mano?) nia « mikrofonparolantkantistmuzikistino » trovas sian mansakon tute plena je paperĝoj uzitaj kiel manĝtukoj, sed taŭge uzotaj por skribi muziknotojn. Pro tio, la feliĉa ruĝa LOLO ĝoje radias. Por paroladi, Lille-grupo-sekretario bezonas malpli multe da papero (eta vizitkarto sufiĉas), sed, perfiĉe, li ĝin uzas por altrudi al la ĝentilaj aŭdantoj, post la manĝo, maldigesteblan parolatan deserton, dankmaniere. Feliĉe ke S-ro Waringhien diris kelke da vortoj tre agrablaj, por danki la aranĝintojn kaj deĵorantojn de la stando, nome ges-rojn V...

Finigas la gaja tagmanĝo per la Espero. Nun, retrovante sian federacian prezidanton, S-ron Alberic Humez, la stelplena karavano ekpaŝas al la Foiro, sub la suno, ĉar la « tagmeza suno » forpelis la pluvajn nubojn. Eniro senpaga, kaj rekte al nia stando.

Ĉarma, tute verda loko, kie belegaj steloj brilas kaj radias super busto de Zamenhof, kies bona rigardo trafas la koron de ĉiuj esperantistoj. Feliĉe ke la steloj ne estas meteoroj, ke la vizaĝo de Zamenhof altrudas respekton, ĉar kelkaj kamaradoj avideme konsideras la stelaron por eventuala ekspozicio, dum S-ro Deligny ameme rigardas la buston de Zamenhof, kiun li volonte en-

metus en sian valizon! Pacienca, venos la fino de la Foiro.

Tie ĉi paperĝoj, ankoraŭ paperĝoj sed vivantaj paperĝoj, kiuj parolas al nia spirito. Estas multe da ekspoziciataj libroj de literaturo ĝuste duonjarcent, sed jam tiel riĉa!

Ĉiuj mire rigardas kaj fine aĉetas...

Mi spionadas: Kurnelo alte staras antaŭ la busto krucigante siajn brakojn... S-ro Humez enspiras la « aeron » de la aĉetantoj priprensante sian kason; li ĝuas bonan momenton, kun sia ĉiam ridetanta edzino... La mirinda S-ro Deligny kaj nia fama gramatikisto W. montras librojn kaj konsilas pri la kvalito; la bibliotekisto de Saint-Omer estas en sia medio, pli polva ol ora... La konstanta deĵorantino S-ino Volqueman daŭrigas la vendon, gaje parolas, enskribas prezojn kaj ŝajnas kontenta pri la multaj aĉetantoj. Bona tago, diros ŝi... Efektive estos bona tago por la federacia kaso kaj por la propagando.

En sia angulo, la karikaturisto Hem daŭrigas sian laboron; li uzas ankaŭ multe da paperĝoj kiujn li nigrigas kaj ruĝigas, por la malespero de liaj klientoj, kiuj dezirus flatemajn portretojn. Alia kamarado, kurioza sed precipe scivolema, serĉesplorema, ...sin enŝovas en la budon, same kiel muso, senbrue, kun siaj etaj ruzaj okuloj kaj polica flaro, por ŝovi sian nazon en paperĝojn, ĉar ankaŭ li ŝategas la paperon pli ol la monon (estas vere, ke ambaŭ estas similaj). Baldaŭ post malgranda ĉirkaŭarondo en tiu verda kaj polva loko, nia stranga scivolemulo (ho! tiuj ĵurnalistoj!) eliras kun « sia Nazo tute Verda » kaj polva. « Ne gravas, diras li, mi naskiĝis kun tiu speca signo... » Sed liaj brakoj estas ŝarĝitaj de paperĝoj: papero, havas flugilojn, ĉu ne? Afero ne tute klaraj sed mi scias, pri tio, ke karikaturoj de kelke da gekamaradoj eklugis subite en liajn ĉarmigajn manojn de sur la muroj. Eble ian tagon, ili reaperos ien... ĉar la ĵurnalistoj nenion perdas kaj forgesas...

La tago finiĝis ĝoje por ĉiuj, sub la radia suno kiu salutis la disiĝon de la geesperantistoj. Gis la!

LILLE'ANO.

Uzu kaj praktiku Esperanton internacie...

KORESPONDU!

Francujo. S-ino MABSAT - RICHARD, 9, rue François-Gauthier, en LENS (Pas-de-Calais), deziras korespondadi pri ĉiuj temoj, kun alilandaj gesamideanoj.

Japanujo. F. FAKUBE, 1241, Kokonokaiĉi, FUNABAŜIMAĈI, ĈIBA-KEN, 20-jara studento, deziras interŝanĝi P.I.

Hispanujo. Antonio GUERRERO, Rogue n° 1-2 « pension », en AVILA, deziras interŝanĝi P.I.

SKOLTOJ DE TROMSO (Norveglando)

★ SKOLTOJ serĉas francajn skoltojn por interkorespondado per leteroj pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝos p.k., p.m.

Bonvolu sendi proponon al S-ro Rolf H. Holm, La Norda Lumo, en TROMSO (Norvegujo).

Vivo de la Grupoj

*

ABBEVILLE. — ĈU LA PLEJMALJUNA ESPERANTISTO? — Nia grupo akceptis la aliĝon de S-ro Léon Hiver, el Frucourt, kiu, kvankam 78 jara, ne hezitis eklerni Esperanton. S-ro Hiver komencis studi la lingvon per koresponde en julio kaj, por perfektigi, aliĝis al nia grupo.

Cetero, li estis la unua, kiu aliĝis al la Amiensa Kongreso kaj iros tien akompanata de aliaj grupanoj.

Bela ekzemplo pri energio por la junuloj.

ANZIN. — Nia grupo organizas grandan balon kun loterio la 25^a de Aprilo en « Kolombo dancejo », la plej fama en la regiono. Oni antaŭvidas gravan sukceson. Ĉar multaj biletoj estas jam disvenditaj. Dum la balo oni efektos « Feŝon de Kolombo » inter la lokaj belulinoj.

Du el niaj plej kuraĝaj grupanoj S-roj Lekieffre kaj Capiez, pasigas la ekzamenon por Supera Atesto pri Lernado.

ARRAS. — S-ro Philippe, urbarkitekto en Arras, membro korespondanto por Nord-franco de la Asocio « La francaj Gardenoj » kaj de la « Internacia Asocio de Urboj-gardenoj », estis nomita de tiuj du Asocioj kiel riprezentanto en la Pariza Internacia Konferenco. En la tria sekcio: « Scienco kaj Tekniko », li faros recenzon pri Sanitara Urbanismo kaj alian pri Urbo-gardeno.

ARMENTIÈRES. — Kun vera plezuro ni konstata la daŭran kreskadon de la grupo. Tion provas la jenaj faktoj:

La ekspozicio okazinta en la Urbjuĝejo havis grandan sukceson.

La kurso okazas en la Muzika Akademio (ĉu la muziko ne dolĉigas la morojn?).

Ĉiujn korespondantojn oni povas sendi al: Esperantista Grupo, Académie de Musique, Armentières (Nord).

BRUAY. — Dimanĉon la 11^a je la 10^a en la urba Muziklernejo okazis la unua leciono gvidata de S-roj Flaczynski kaj Bialasik, kiujn prezentis al la ĉeestantoj S-ro Gest.

La sukceso estis pli granda eĉ ol ni esperis. 35 gelnantoj apartenantaj al 4 diversaj nacioj alskribiĝis al la kurso. Ni estas konvinkitaj ke ĉiu nombro ankoraŭ pligrandiĝos.

Ni ŝuldas dankojn al S-ro Gest, kiu multe klopodis por sukcesigi la kurson.

BOULOGNE-SUR-MER. — Sekve de la reformo koncerne la edukadon, la duagrada studoj estas antaŭdataj de unujara direktigo. Tiukaze certa nombro de liceoj kaj kolegioj malfermos prove en Oktobro 1937 la suprediritan klason.

Estus dezirinde el pedagogia vidpunkto enkonduki en tiun provklason la instruadon de Esperanto almenaŭ por elprovi la kapa-

blon de la lernantoj al la studo de fremdaj lingvoj vivantaj aŭ mortaj.

En la kazo, se tiu-ĉi deziro efektiviĝus ni ekscias, kun plezuro, ke S-ro Favre, profesoro en kolegio Mariette en Boulogne-sur-mer proponis sin, kiel instruanton de Esperanto en tiu direktiga klaso.

Ni bondeziras ke en 1937 oni malfermu tiujn klasojn kaj provmaniere instruu en ili Esperanton.

CALAIS. — En Oktobro 1936 la societo fotografia aranĝis ekspozicion « La plej bela foto de Calais », kiun vizitis 4000 personoj; ili povis admiri tie la grandan Esperantobudon.

En venonta Oktobro, nia societo helpas la Esp. grupon « Verda Stelo » farante novan demonstracion favore al Esperanto. S-ro Masson parolados pri D-ro Zamenhof, liaj vivo kaj verko; li faris ankaŭ alvokon al la Dunkerque-anoj por ke ili helpu lin propagandi en Calais.

DUNKERQUE-MALO. — Merkredon la 24^a de Marto, en Restoracio Trassaert, okazis gaja kunveno. F-inoj Dequecker kaj Terrière ĉarmigis nin per belaj kantoj, kaj ambaŭ meritis gratulojn. Ni revidis tie, kun plezuro, nian afablan samgrupanon Dewaele, soldaton en Givet, kiu rakontis kelkajn amuzajn anekdotojn pri la vivo en la kazerno. Bedaŭrinde, kiel kutime, la horoj tro rapide pasis kaj oni disiris post la kanto de la Espero.

La du kursoj — elementaj gvidataj de F-inoj Pauwels kaj Kiesecons, same kiel la perfektiga kurso de S-ro Maurice Nogé — havis daŭre grandan sukceson.

F-ino G. Cléty, bele distingiĝis en la Birmingham'a libertempo kiu ni partoprenis kun 10 esperantistaj knabinoj — el Somain (9) kaj Longueau (1) — sub gvidado de F-ino Lepachelet; ĉiuj estas ravitaj pro la bonega akcepto kaj la ĝoje pasigita semajno.

La 17^a de Aprilo, en la Urbodomo, tre interesa prelego de S-ro Grenkamp-Korneld pri la « Vivantecon de Esperanto » kun alvoko al la 29^a Universala Kongreso, en Varsovio.

Nous apprenons avec plaisir le tout récent mariage de notre ami DONSBECQ Gérard, qui fut un des premiers animateurs de notre groupe et le co-fondateur de l'ancien bulletin « Antauen ». Nous lui présentons nos bien vives félicitations.

HAUTMONT. — Jen la rezultatoj de la balotelektoj de la grupkomitato por 1937: Prezidanto: S-ro Charlet; vicprezidantoj: S-ro Cheminats kaj F-ino Gillard; sekretario: S-ro Pefitils, 8, rue Jules Carret, Hautmont; kasisto: S-ro Biqué; radiodelegito: S-ro Parent.

JEUMONT. — Al Ges-oj Burton, sekretario de la Esp. grupo, 184, rue de Maubeuge, naskiĝis filo Camille. Tutkorajn gratulojn al la feliĉaj gepatroj.

LILLE. — La sekretario de Lille'a grupo, havas la devon kaj plezuron tutkore danki la gekamaradojn kiuj kunlaboris kun li ĉu por aranĝi la standon, ĉu por deĵori dum la foiro. Li volonte uzas anglon de ĉi tiu bulteno por tion fari sin turnante nome al S-roj Deligny, Stult, Humez, Chayet, Dujardin, Curnelle, Tible, Mopin, Dañon, Carpentier, al F-inoj Andrée, J.-E. Boursier, Wybaillie, Debry, Brouard, Lecomte.

Li prezentas apartan dankon al S-inoj Duffot kaj Volquemant, kiuj deĵoris multe pli ol sia vico.

Dankon al ĉiuj kiuj donis stajn tempon kaj monon.

LENS. — Dum la lasta grupkunveno oni nomis sekretariojn S-inojn Olga Garbus, rue Decrombecque. — Okazis ekzameno por Atesto pri Lernado, gvidata de S-ro Brunet. — Okazis gaja vespero gvidata de S-ro Max.

La grupo intencas aranĝi Esp. budon dum la Komerca Foiro okazonta dum Junio.

PONT-SUR-SAMBRE. — Dum la pasinta monato okazis kunveno de nia grupo. Oni decidis klopodi por trovi membrojn subtenantojn.

La grupkomitato skribis al la tri deputitoj: S-roj Deudon Lagrange kaj Gernez, petante ilin aliĝi al la Parlemana Esp. grupo. S-ro Lagrange respondis ke li ne povas, ĉar li estas ministro; S-ro Deudon respondis jese kaj S-ro Gernez ne ankoraŭ respondis.

A la Jerneĵanoj estis disdonitaj propagandaj sorbapaperoj.

Ĉiu kursano havas baldaŭ eksterlandan korespondanton.

SAINT-POL-SUR-MER. — La du kursoj daŭras; ĉiujande kelkaj fervoraj gelnantoj ĉeestas regule la elementan kurson. Post la leciono, S-ro Lasuye rakontas kelkajn anekdotojn kaj legas ĉapitron de la esperanta romano « Nik Nek kaj Kat Jen ». Kaj la gelnantoj, precipe la fraŭlinoj, aŭskultas atentege kaj kontentege.

Ĉiŝabate, deko da geesperantistoj perfektigas laŭ la bona metodo « Verda libro ».

Bedaŭre, kelkaj lernantoj, kiuj estas fervojistoj, ne povas regule ĉeesti la kunvenojn.

TOURCOING. Baldaŭ estos starigita grupo en Tourcoing. Jam ni kuniĝis kvinope, ni multe esperas ke post nelonge estos plibone ankoraŭ.

S-ro Piard, ankaŭ S-ro Vauthier, helpas S-roon Gérard Simoëns en la propagando.

GRAVA! Niaj monrimedoj estas limigitaj, pro tio la amplekso de *N. E.* ankaŭ. Ne koleru se vi artikolo ne aŭ ne estas ĉiuj enpresata.

Ĉu vi varbis abonanton dum la pasinta monato?

Se ne, dormu maltrankvile !!

Memoriga Manifestacio en FRESNES kaj CONDÉ

La 3^a de Aprilo la Esperantista Grupo de Fresnes-Condé aranĝis manifestacion memore al leŭtenanto MANNEVY, kreinto kaj unua sekretario de la Grupo, mortfalinta glorie sur batalokampo en 1912, kiam li estis kliniganta super vandita kolego.

La lokaj esperantistoj kunvenis je la 10^a antaŭ la Urbodomo de Fresnes de kie ili procesie iris tra la ĉefaj stratoj de la urbo Fresnes ĝis la Urbodomo de Condé, antaŭ kiu atendis ilin eminentuloj kaj lokaj samideanoj. Post la fotografado formiĝis grava procesio: ĉe la kapo S-ro Carlier portis belan verdan standardon; tuj post li paŝis la portantoj de florgarboj kaj S-ro Popiel, sekretario de la grupo, kun bela marmortabulo sur kiu vidigas verda stelo kaj alskribajo « Ni memoras ». Poste iris la eminentuloj: urbestro de la ambaŭ urboj, Komandanto Bouillet de la 43. infanteria regimento, kaj la grupestroj.

Oni trairis solene la tutan urbon ĝis la tombejo. Survoje la loĝantoj rigardis nin kaj pie demetis la ĉapelon por saluti nian verdan standardon, emblemon de PACO kaj fratiĝo.

Sur la tombejo, S-ro Houriez, vicurbestro de Condé, paroladis en la nomo de S-ro Delcourt, urbestro, kaj de la tuta urbestroaro, kaj deponis bronzan palma-branĉon. Post li paroladis S-ro Centnersver, en la nomo de la Nordfranca Federacio, kaj fine S-ro Aldebert, prezidanto de la Esp. grupo kiu preparis la tutan vivon de nia neforgesebla samideano: « ...en la jaro 1912 la gesamideanoj skulptigis sur la funebra monumento la frazon « *Ne forgesu lin* »; en la jaro 1937, t. e. post 25 jaroj, la grupo de Fresnes-Condé respondas « *Ni memoras* » ».

Post la ceremonio ĉiuj disiris, premiate kun emocio la manon de nia samideanino S-ino Mannevy, vidvino de la leŭtenanto.

Jen la paroladeto de S-ro Centnersver:

« En la nomo de la Komitato de Nord-franca Esperantista Federacio kaj en la nomo de ĉiuj gefedaracioj mi respektplene klinas mian kapon antaŭ la tombo de leŭtenanto Mannevy.

« Jam multaj jaroj pasis de kiam Li forlasis nin, sed la memoro pri tiu nelacigebla pioniro de nia Movado restos por ĉiam vivanta inter ni.

« Li semis bonan grajnon. Ŝajnis unue ke post Lia morto ĝi tute perdiĝis. Ho! ne. Subite la grajnoj jetita sur fruktodonan teron ekĝermis kaj el ĝi elkreskis bela fioreto: la Esperantista Grupo de Fresnes-Condé.

Ĝi estas ankoraŭ tute juna, subtila, sed legata gepatre de Liaj vidvino Sinjorino Mannevy kaj amikoj, ĝi firme kaj daŭre kreskos eternigante la memoron de ĝia kreinto leŭtenanto Mannevy. »

Adhérents au Congrès

(DEUXIÈME LISTE)

142. s-ro	Lenglé,	Anzin
143. s-ro	Erjavec,	Lens
144. s-ro	Carlier,	—
145. s-ro	Roucoux, Longpré-les-Corps-Sts	—
146. s-ro	Raupujare Robert,	—
147. s-ro	Raupujare Marcel,	—
148. s-ro	Plately,	Rosendaël
149. s-ino	Plately,	—
150. f-ino	Verdez,	Albert
151. f-ino	Andry Suzanne	—
152. f-ino	Andry Marie-Louise	—
153. f-ino	Rayon,	Amiens
154. f-ino	Rayez,	—
155. s-ro	Lefebvre Irénée,	Hénencourt
156. s-ro	Blanchet,	Avesnes-sur-Helpe
157. f-ino	Blanchet,	—
158. f-ino	Couget,	Dunkerque
159. f-ino	Carouge,	Albert
160. s-ro	Léger,	Amiens
161. f-ino	Réboré,	—
162. s-ro	Fréville,	Airaines
163. f-ino	Revel	—
164. s-ro	Macke,	Arras
165. s-ro	Dubois,	Lens
166. s-ino	Mohr	—
167. f-ino	Mohr,	—
168. f-ino	Schleider,	—
169. s-ro	Borensztein	—
170. f-ino	Borensztein,	—
171. s-ro	Duclerq,	Abbeville
172. s-ro	Racine,	—
173. s-ro	Dequesnes,	Anzin
174. s-ro	Audegond,	—
175. f-ino	Roussel,	Longueau
176. s-ro	Trémolet,	Amiens
177. f-ino	Trémolet,	—
178. s-ro	Guibert,	—
179. f-ino	Guibert,	—
180. s-ro	Maupin,	Abbeville
181. s-ro	Vicart,	Boulogne-sur-Mer
182. s-ino	Vicart,	—
183. s-ro	Couret	—
184. f-ino	Delattre,	—
185. s-ro	Vaniet,	—
186. s-ro	Marcand,	Pont-de-la-Deule
187. f-ino	Gillard,	Hautmont
188. f-ino	Dujardin,	Boulogne-sur-mer
189. s-ro	Kert,	—
190. f-ino	Méhaye,	—
191. s-ro	Gaudin,	—
192. f-ino	Leclercd,	—
193. s-ro	Bouvier,	Poix
194. s-ino	Christel Alfut,	Liard
195. s-ro	Dammeray,	Borre
196. s-ro	Hoyez,	Amiens
197. s-ro	Couteaux,	Avesnes-sur-Helpe
198. s-ino	Couteaux,	—
199. s-ino	Brunois	—
200. s-ro	Louatron Turold	—
201. f-ino	Denis Renée	Dunkerque
202.	Groupe de Pont-sur-Sambre.	—
203 à 212.	Groupe de Beauvais.	—

La nombro de la ĝisnun aliĝintaj kongresanoj estas 212. Tio antaŭvidigas gravan sukceson.

Se vi ankoraŭ ne aliĝis, faru tion senprokraste.

ANGLAJ SAMIDEANOJ TRAVOJAĜOS NORDFRANCUJON

S-ro C.-H. Bingham fakdelegito de I. E. L. en Londono intencas dum sia libertempo travojaĝi Nordfrancujon kun sia amiko. Lia vojaĝo komenciĝos la 5^{ma} de Junio kaj daŭros du semajnojn. Li ege deziras renkonti survoje gesamideanojn kaj ĉeesti grupkunvenojn. Nia afabla samideano kun kiu ni havis okazon konatiĝi dum la Belga Esp. Kongreso en La Louvière, ne volas ĝeni esperantistojn per gastigado; pro tio li petas nur informojn pri mezklasaj hoteloj kaj pri la grupkunvenoj, tiumaniere li povos aranĝi vojaĝprogramon.

Bonvolu sendi tiujn sciligojn eventuale inviton al S-ro J. Cent, 9, rue Ferrand, à Valenciennes, kiu transsendos ilin al S-ro Bingham.

Nia Konkurso

La manko de loko devigas nin prokrasti la publikigon de la rezultoj de nia konkurso « La Astronomo ».

La Coupe « André Boyer »

Le concours ouvert entre les groupes esperantistes affiliés à la Société française pour la propagation de l'esperanto et doté de prix importants par M. André Boyer, de Cannes, vient de se terminer.

Il s'agissait de récompenser l'activité montrée par ces groupes durant le dernier exercice, activité jugée, en fonction de la population de la ville considérée, d'après le nombre des membres du groupe, le nombre des diplômes primaires et supérieurs obtenus par des membres du groupe correspondant, etc.

Le classement a donné les résultats suivants :

1^{er} prix, la coupe et 500 francs de livres : groupe « Prateco », à Pont-sur-Sambre (Nord) ;

2^e prix, 300 francs de livres : groupe de Sablé (Sarthe) ; 3^e prix, 200 francs de livres : groupe d'Arras (Pas-de-Calais) ; 4^e prix, 100 francs de livres : groupe d'Avesnes-sur-Helpe (Nord) ; 5^e prix, 50 francs de livres : groupe de Hautmont (Nord) ; 6^e prix, 25 francs de livres : groupe de Hagueneau (Bas-Rhin) ; 7^e prix, 50 francs de livres : groupe de Vallauris (Alpes-Maritimes), comme premier groupe classé de la Fédération de Provence.

Se sont ensuite classés dans l'ordre les groupes de Thouars (Deux-Sèvres), Douai (Nord), Dunkerque (Nord), Amiens (Somme), Beauvais (Oise), Soissons (Aisne), Châteauroux (Indre) et Strasbourg (Haut-Rhin).

Nos félicitations aux lauréats et nos remerciements au généreux donateur de la coupe et des prix, M. André Boyer, un des plus actifs animateurs du mouvement esperantiste français.

XXIX^e Universala Jubilea Kongreso de Esperanto EN VARSOVIO, 7-15 DE AŬGUSTO 1937

ALVOKO

Kara Samideano,

En la nuna malfavora por nia movado tempo, la tutmonda esperantistaro solene festos la Oran Jubileon de Esperanto-ekzistado. Dum kvindek jaroj dank'al laborado, penadoj kaj klopodoj de miloj da nekonataj pioniroj, oferemaj idealistoj, la esperanta movado divastiĝia ĉiam pli, kreinte multajn konsiderindajn valorojn kaj kulturajn trezorojn.

Por brile kroni la Jubileon de Esperanto okazos en Varsovio la Universala Kongreso. Ĉe la tombo de nia neforgesbla Majstro kolektiĝos la reprezentantoj de multaj popoloj, kiujn la genio de Zamenhof kunligis per unu lingvo komuna.

Cu troviĝas en la vasta mondo Samideano kiu ne dezirus klini la kapon antaŭ la cindroj de la Majstro ? Cu ekzistas Samideano kiu ne volas konatiĝi kun la urbo, en kies muroj verkis kaj laboris la Majstro kaj liaj novaj fidelaj disĉiploj : Grabowski, k.t.p.

Kara Samideano ! Tiu-ĉi kongreso devas esti potenca demonstracio de nia movado kaj forta pruvo al la indifera mondo pri nia ekzisto. La kongreso tamen estos impona, se ĝin partoprenos kiel eble plej multe da samideanoj. Tial ne hezitu kaj aliĝu tuj al la Jubilea Kongreso en Varsovio ! Se vi mem ne povas ĉeesti nian Feston Tutmondan, zorgu, ke almenaŭ aliaj samideanoj veturu al Varsovio. La Loka Kongresa Komitato klopodas pri diversaj aranĝoj kaj penas kontentigi la karajn gastejojn. Via devo estas partopreni LA JUBILEAN por manifesti nian volon kaj deziron marŝi antaŭen ĝis la venko de nia ideo.

Kara Samideano ! Varsovio, la ĉefurbo de Polujo, Varsovio, la lulilo de Esperanto-Movado, Varsovio, la eterna ripozejo de nia Majstro, plej kore invitas vin !

LOKA KONGRESA KOMITATO.
WARSAWA, CHMIELNA 26.

Same kiel aliaj Esperanto-revuo, Nf.E. certigas la publikigon de dek numeroj pojare. Tamen por ne interrompi dum tri sinsekvaj monatoj la aperon de la bulteno dum la libertempa periodo, Nf.E. aperos la 20^{an} de Junio kaj la 20^{an} de Aŭgusto kaj reaperados regule ekde la 1^a de Oktobro 1937.

Redakcia Leterĥesto



Ni ricevis lastatempe multnombrajn leterojn : gratulajn, kritikajn, kuraĝigajn, k.t.p. Bedaŭrinde ne estas eble al ni respondi al ĉiuj.

Al Ge-D. en Bulonjo. — Dankegon. Almenaŭ vi estas sinceraj. Via letero kiu estis legata dum nia klubkunveno tre plezurigis nin. Sed alioje skribu esperantlingve kaj ne petu helpon de « iuj gesinjoroj » kies stilon ni tiel bone konas ke tuj ni divenis ke « ili » flustris tion al via orelo. Estonte estu singardema. Sciigu vian adreson, ni sendos al vi klientojn. Pri « lingvaĵoj » turnu vin al Delavigne kiu posedas plenan kolekton ilustritan. Ĝis...

Al J. V. — Ni transdonas ĝin kaj vi ricevos respondon de ŝi. Almenaŭ tion ni esperas. Saluton.

Al S-ino R. T., en C. — Ni bone notis vian mendon de la kolekto bindita de Nf.E. Dankon kaj saluton.

Konstanta Subteno

Oni petis nin sciigi en nia revuo ĉu la baptifesto de Nordfranca Esperantisto jam okazis. Bedaŭrinde ĝis nun ni vane atendadis la ONKLON EL AMERIKO ! Pro ties nealveno, ni prokrastis la feston. Se tamen, inter vi, geamikoj estas unu (aŭ eĉ pluraj !) kiu deziras lin anstataŭigi, rapidege anoncu vin ! Jen la listo de la parencoj de Nf.E. (legu : malavaraj geamikoj) :

- Ge-baptopatroj. S-ino L. S-ro Albcric Humez.
- Avo S-ro E. Deligny.
- La granda frato Grupo Esp. de Dunkerque.
- Onklino S-ino Vanhersecke.
- Kuzoj S-ro A. Dumarquez.
- S-ro E. Houzé.

Kaj nun ni profitas la okazon por danki ĉiujn kiuj pruvis sian intereson por nia revuo sendante al ni kuraĝigajn vortojn kaj gratulojn. Kelkajn ni volas tutspeciale danki ĉar ili efektive subtenis Nf.E. per monofero. Al ili ni ŝuldas ke nia gazeto pliboniĝas kaj disvastiĝas. Ni vere estas kortuŝitaj ĉar antaŭ ol malfermi tiun rubrikon « KONSTANTA SUBTENO », jam kelkaj geamikoj sin enskribiĝis.

Plej varman dankon al ĉiu.

UNUA LISTO :

S-ro Wilquin, en Parizo	23 fr.
Benoit, en Oosduinkerque...	20 »
Max, en Lens (la esperantista tajloro).....	5 »
Tri Arras-aninoj	7 »

Entute..... 55 »

ĈE LA FLANDROJ

Ĝis nun ni parolis nur pri la verkoj de nia Majstro. Kial? Ĉu nia literaturo nuna ne estas pli esprimriĉa, pli elasta? Certe jes. Sed tamen!

Unue ni ja honoru nian Majstron ĉar li donis al ni multe pli dum sia laborplena vivo ol ni kapablis perfektigi kaj plivivigi lian verkon.

Kiom da jaroj li zorgo, facelis jen aldonante ion, jen forprenante tion por fine certigi, ke la bazo nun estas sufiĉe solida por ke juna lingvo plue libere kresku kaj disvolviĝu.

Artiste li flegis sian kreaĵon. Artiste, ĉar li, por kinu la lingvoj estis muziko, komponis el la multnombraj, ofte disharmoniaj muzikaj unu grandan, mirige belan harmonian verkon.

Kun tiu verko, kun la tuta verkaro de nia Majstro necesas antaŭ ĉio konatiĝi. Poste ni aŭskultu la modernan muzikon. Povas estis, ke multaj ĝin ne tiel facile komprenas.

La emon ampleksi pli ol propran lingvon aŭ kulturon ni vidas jam ĉe la patro Marko Zamenhof, kiu kolektis proverbojn el diversaj lingvoj, kiujn li eldonis en la verko « Frazologio rusa-pola-franca-germana. » Laŭ tiu verko nia Zamenhof kompilis la 82 paĝan « Proverbaro Esperanta ».

Ekzempla honorigo al sia nobla patro, belega pliriĉigo de nia literaturo. Ja ankaŭ la esperantistoj havu sian proverbaron.

Kiu ne jam konas ĉi tiun verkon gustumu laŭ jena oferto:

Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon.
Kiu ripetas abunde, lernas plej funde.
Kia la kapo, tia la ĉapo.
Lupo ŝanĝas la harojn sed ne la ferojn.
Li ŝtelas de najbaro, por doni al altaro.

Speciale por la sinjorinoj kaj fraŭlinoj:
Virino scias-tuta mondo scias.
Kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas.
Virino kolera pli ol bundo danĝera.

Atentu fraŭlinoj:
Kaprica fianĉino restos eterne fraŭlino.

Pli ol 1200 vi trovos. Eĉ ke:
Kiso antaŭ amaso estas kiso de Judaŝo.

Evidente tio ne valoras por la francoj: ni diru, ne por ĉiuj. Kaj la sinjorinoj, kiuj jam protestas kontraŭ la hazardaj specimenoj ne timu. Ĉar ankaŭ Zamenhof bone sciis, kiom multe la virino signifas en la vivo de idealisto, kia li.

Cu sen ŝi estus eble fari kion li faris?

S.

Ne forgesu la « internan ideon »

estas la titolo de ĵus aperinta libro, kiun verkis nia samideano Sipke STUIT, kiun la pli multo de niaj delegatoj tre bone konas.

S-ro Stuit faris dekojn da paroladoj en diversaj landoj kaj ankaŭ en nia regiono, kie li plie konatigis centojn da gelernantoj kun la lingvo kaj idealo de Zamenhof.

Regule ni povas legi lian rubrikon « Literatura angulo », kiu sendube interesas nian legantaron.

Tial la libroj de nia amiko Stuit certe trovos legemulojn.

La enhavo temas pri liaj nunaj kursoj en Flandrujo, kie li havas pli ol 20 gelernantojn. Do, epizodoj pri la ĉiam gajaj lecionoj de la Ĉe-metodo kaj ankaŭ kelkaj impresoj kaj travivaĵoj personaj.

Ĉar verkita por la gelernantoj, la stilo estas tre simpla, klara sed samtempe flua. Entute agrabla, leginda verketo.

Oni povas ricevi la libron (kiel ĉiujn aliajn esper. librojn), ĉe ESPERANTO, BAUDIMONT-ARRAS (Pas-de-Calais). Niaj Dunkerke-aj gesamideanoj povas ĝin ricevi ĉe S-ro VERNAY. Prezo 5 fr.

LA VERBO EN ESPERANTO

Teorio kaj praktika uzado. Verkis Julius Glück kaj J. H. J. Willems. (Formato: 15,5 × 23,5) Paĝoj: 47. Eldonita de W. J. Thieme et Cie, Zutphen, Enderlando.

Prezo: 0,65 guldenoj.

TU SERAS ESPERANTISTE!

par Pierre DELAIRE, aŭteur de « L'Espéranto en douze leçons ».

Ce livre, écrit en dehors de toute opinion politique ou religieuse, démontre l'utilité d'une langue auxiliaire pour les relations internationales tant matérielles que morales.

« L'homme qui désire ardemment la paix fera vite de l'Espéranto son idéal », écrit-il.

Puis, après avoir démontré brièvement que l'Espéranto est la seule solution du problème, Pierre Delaire fait une étude sur la logique et l'extrême facilité de la syntaxe espérantiste, ce qui fait de l'Espéranto une langue vivante. La deuxième partie du livre est consacrée à l'histoire de l'Espéranto.

Notons que le Ministre de l'Education Nationale, qui s'occupe actuellement de la question de l'introduction de l'Espéranto dans les programmes scolaires et qui est un concitoyen de Pierre Delaire, a accepté la dédicace de cet ouvrage que doit lire et faire lire tout homme qu'intéressent le Progrès et la Paix.

« Tu seras Espérantiste » est en vente à ESPERANTO-OFFICE, 63, rue de Palay, à Orléans. — Envoi franco: 5 francs.

Dans la Presse française

DU PROGRES DE LA SOMME :

CE QU'IL FAUT

Dans le bulletin de la Conférence internationale « L'Espéranto dans la vie moderne » qui aura lieu à Paris, les 14, 15, 16 et 17 mai 1937, le président de cette Conférence, M. André Baudet, ancien président de la Chambre de Commerce de Paris, écrit entre autres choses :

L'esperanto n'est pas seulement une langue écrite, c'est aussi une langue parlée qui, par ses qualités propres, est prononcée exactement de la même façon par les différents peuples. Il faut que, dans un avenir rapproché, le Français ou l'Anglais qui arrive en gare de Prague ou d'Helsinki puisse appeler un taxi, retenir une chambre d'hôtel, commander un repas, demander un renseignement à un agent de police en utilisant la langue auxiliaire.

La Société des Nations, dont l'action en d'autres matières semble se réduire, pourrait, sous cet angle des échanges commerciaux et touristiques, rendre les plus grands services, en invitant les gouvernements à introduire l'esperanto obligatoire dans les programmes scolaires. En quelques mois, les hommes seraient capables de se comprendre, même quand ils voyagent à l'autre bout du monde, même quand on leur écrit du Japon ou du Venezuela.

Pour la reprise économique, aucun facteur ne doit être négligé. Nous essaierons en mai prochain, à la Conférence internationale de Paris, de montrer que l'esperanto est un de ces facteurs dont l'utilité doit être tenue pour incontestable et dont l'usage courant serait extrêmement facile à généraliser si les Pouvoirs publics voulaient bien s'y intéresser dans tous les pays, comme ils ont commencé à le faire dans quelques-uns.

L'ESPERANTO ET LES P. T. T.

L'Exposition Internationale de Paris 1937 a décidé d'utiliser l'esperanto et d'étudier par le fait ce que cette langue, dans l'état actuel des choses, apporte à l'industrie, au commerce, à l'information et à la pensée.

Dans ce but une conférence mondiale est convoquée à Paris, dans le cadre même de l'Exposition, les 14, 15, 16, 17 mai 1937.

Les P. T. T. y prendront une part très active dans la section « relations internationales ».

L'esperanto est du reste largement utilisé dans les P. T. T. Les camarades espérantistes se sont groupés dans une Ligue internationale qui édite depuis quinze ans une revue mondiale des P. T. T. dont les études et les informations ont été traduites dans de nombreux journaux professionnels; un recueil d'adresses des P. T. T. qui vient de

paraître indique 50 villes du monde possédant des P. T. T. espérantistes; les administrations de Hongrie, d'Autriche, de Suisse, du Brésil, de l'U. R. S. S. utilisent officiellement l'esperanto; des organisations syndicales de plusieurs pays ont désigné des secrétaires espérantistes, et des revues professionnelles utilisent cette langue pour leurs enquêtes ou leurs informations.

De L'ECLAIREUR DE NICE :

UNE EXPERIENCE PRATIQUE

Dernièrement, à Manchester, il s'est tenu un petit congrès de spécialistes des arts graphiques. Il y avait là des hommes appartenant à différents pays.

Pendant toute la durée de leur réunion, ils ont traité des divers problèmes touchant la gravure, le clichage, l'imprimerie, etc., problèmes successivement relatifs à la technique professionnelle et à l'organisation syndicale.

En dépit de la différence des nationalités, tous les échanges de vues ont été faits et les décisions prises sans l'intervention d'interprètes; tous les congressistes, en effet, parlaient l'esperanto.

De L'AVENIR DU VIMEU :

L'ESPERANTO, RAMEAU D'OLIVIER

Nous reproduisons les mots qu'écrivait dans un erveve espérantiste une personnalité dunkerquoise du corps enseignant, en parodiant une phrase célèbre, pour ne pas dire cynique, du directeur d'un pays européen :

« Notre rameau d'olivier, à nous espérantistes, apparaît au milieu de myriades d'étoiles et nos cœurs se refusent à voir sur l'autre rive de la rivière ou de l'autre côté de la montagne des chiens baveux ou des tigres menaçants. Partout il y a de braves gens! Qu'il est donc facile de faire croire à deux êtres qui ne peuvent se comprendre, qu'ils sont des ennemis! Comme il est facile d'éveiller en eux des sentiments de doute, d'inquiétude et finalement de haine! L'Espéranto rompt rapidement le miroir déformant au travers duquel s'observent réciproquement les hommes des diverses nations.

Un homme, un autre homme.
Une mère, une autre mère,
Une épouse, une autre épouse,

et les uns ressemblent aux autres, à travers les époques et dans tous les pays. Ils s'aperçoivent et réalisent enfin, grâce à l'esperanto, qu'ils vivent la même vie, qu'ils ont pour but le même idéal, en un mot qu'ils sont frères ».

DISTRAĴOJ

1. PROBLEMOJ (de S-ro Bernard)



Anstataŭigu la literojn X per ciferoj tiel ke horizontale kaj vertikale la sumo estu 19. Sed atentu, la sumo de ĉiuj ciferoj devas esti 56 en la unua problemo kaj 40 en la dua.

2. KRUCVORTOJ (de S-ro Cavier)



Horizontale: 1. Artikolo; Konformiĝi (sen finaĵo); Prepozicio; 2. Du literoj el vico; Virina vesto (s. f.); Sufikso; 3. Fluganta aparato; 4. Finaĵo de multaj verboj; Sufikso; 5. Danga roko en la maro (s. f.); Fama parto de veturilo (s. f.); 6. Duono de lobo; Konjunkcio; 7. Piŝetoj; 8. Sufikso; Sufikso; Duono de napo; 9. Prefikso; Prepozicio; Nombro.

Vertikale: 1. Tri literoj el liaso; Parto de orelo (s. f.); 2. Modernaj aŭtomobiloj ne plu uzas ĝin; 3. Kvin literoj el fraŭlino; 4. Flava metalo; Sur antikvaj tomboj (s. f.); 5. Patrino de edzino; 6. Sufikso; Tri literoj el sorbi; 7. Spirebla gaso (4 literoj); 8. Vira vesto; 9. Duono de vaporo; Vira vesto (s. f.)

Noto. — s. f. signifas sen finaĵo.

Sendu solvojn aŭ komunikaĵojn pri tiuj «DISTRAĴOJ» ĝis la 31-a de MAĴO 1987 nur al nia kunlaboranto, S-ro DAMMEREY en BORRE, par Hazebrouck (Nord).

SOLVOJ de la Martaj Konkursoj:

1. PROBLEMO

Por tute kovri la lageton, la du nufaroj bezonus 29 tagojn.

2. SILABENIGMO

Tra densa mallumo briletas la celo
Al kiu kuraĝe ni iras.

(2 versoj el la *Vaĵo*).

SOLVINTOJ:

Ricevis 40 poentojn: F-ino Lavallart, s-ino Delavigne, s-ro Humez, s-ro Trémont, s-ro Brunet, s-ino Lotthé, f-ino Coquelet, f-ino Colléatte, f-ino Dulos, s-ro Bernard, s-ro Vergez, s-ino Irlande, f-ino Bevière, s-ro Dumarquez, s-ro Mayot, f-ino Andrzejenski, s-ino Ch. Victor, s-ro Prince, f-ino Ciperá, s-ino Caubel, s-ro Cappelaere, f-ino Kerskaw; *35 poentojn:* f-ino Triquet, s-ro Viseux; *20 poentojn:* s-ro Haudrèchy, s-ro Henry.

Solvintino de februaro: Ricevis 25 poentojn: f-ino Ciperá.

DAŬRA KONKURSO

f-ino Lavallart, en Amiens.....	197
s-ino Delavigne, en Longpré.....	197
s-ro Brunet, en Arras.....	197
s-ro Trémont, en Caudry.....	196
s-ro Cappelaere, en Malo.....	196
f-ino Colléatte, en Amiens.....	195
f-ino Andrzejenski, en Amiens.....	194
s-ino Irlande, en Poix.....	194
s-ro Vergez, en Boulogne-sur-Mer.....	194
f-ino Coquelet, en Jeumont.....	182
s-ino Lotthé Faleur, en La Capelle.....	175
s-ro Cavier, en Hautmont.....	155
s-ro Bernard, en Liévin.....	153
f-ino Ciperá, en Pilsen.....	142
s-ro Jonquier, en Arras.....	140
s-ro Haudrèchy, en Longpré.....	140
f-ino Triquet, en Rosendaël.....	135
f-ino Dejuine, en Amiens.....	113
s-ino Renée Héde, en Amiens.....	109
f-ino Bevière, en Coudekerque.....	100

Tiun-ĉi monaton, f-ino Huguette Lavallart en Amiens, kaj s-ino Delavigne, en Longpré gajnas premion.

● Ĉar vi trovas tiel facile solvojn, kial vi ne trovas almenaŭ unu abonanton por nia bulteno? ●

Atentu! Kelkaj partoprenintoj ne sendis solvojn dufoje sinsekve; mi rememorigas al ili ke se ili ne sendos solvon tiun-ĉi monaton, iliaj poentoj ne plu valoros.

DELA VIGNE-POIRET, Imprimeur - Gérant
Longpré-les-Corps-Saints (Somme) - France

Les bonnes adresses de Dunkerque...

KODAKS
PHOTO-AMATEURS

CAYEZ

9^{bis}, Rue Clémenceau - DUNKERQUE

Travaux - Agrandissements
Stocks de toutes marques

Esperanto parolata

ATELIER DE RELIURE ET CARTONNAGE

(Fondé en 1860)

Louis BLOT

10, Rue Dupouy, DUNKERQUE

Reiure en tous genres
de luxe et d'amateur

Esperanto parolata

IMPRIMÉS EN TOUS GENRES - PAPETERIE

RELIURE - GRAVURE

Fournitures classiques et de bureau

Librairie du Beffroi

Albums et Timbres pour Collectionneurs

Livres - Insignes Espérantistes

MOREAU-FOURMEUX

28, Rue Clémenceau, DUNKERQUE

"Au Roi du Saucisson"

Roger BRATS

30, Rue Michelet

COUDEKERQUE-BRANCHE

Fromages, Conserves, Confitures

Vente sur tous les Marchés de la Région

Fabrique de Casquettes

BÉRETS - CHAPEAUX

EDMOND

Chapelier

38, Rue Poincaré - DUNKERQUE

"Les BLEUETS"

26, Rue Poincaré - DUNKERQUE

Blanche RAMOUT

Fleuriste

Vous y fournir, c'est affirmer votre bon goût

Choix de Plantes - Corbeilles

Gerbes et Bouquets

Les Coopérateurs
de Flandre et d'Artois

Toute l'Alimentation

Tous les Vins

Tous les Spiritueux

Poids exact, Juste Prix, Qualité parfaite

Nos succursales sont ravitaillées chaque jour

en Pain, Lait frais pasteurisé

Fruits, Charcuterie, Beurre

VENTE A TOUS

Avantages accordés aux sociétaires:

Ristourne sur prorata des achats

(3,194,244 frs répartis pour 1935)

Secours de la Mutualité Coopérative

(naissance, maladie, décès)

Journal gratuit tous les 15 jours

Dans nos 450 magasins, vous trouverez

la qualité que vous cherchez

les prix qui vous conviennent

Tout l'HABILLEMENT

Hommes, Jeunes Gens

Enfants

AU] BON VÊTEMENT

Maison O. ROZEN

17, Rue des Chaudronniers

DUNKERQUE

Esperanto parolata

FIRMO

Georges MAEGHT

Juvelisto - Artobjektoj

9, Rue Clémenceau, DUNKERQUE

Esperanto parolata

Rabato al niaj Samideanoj

Hôtel recommandé :

HOTEL DE FRANCE

Rue de l'Hôtel-de-Ville, ABBEVILLE

DINOARD, Propriétaire - Téléph. 42

RADIO-APARATO « RENVOX »



Preciza reguligo
Bela aspekto
ALTKVALITA MATERIALO
6 lampoj
CIAJ ONDOJ
Variebla Selekteco
Amerikaj lampoj
Mazgrandaj frekvencoj
(kun fero)
165 kilocikloj

Antaŭ selektigilo efika
Diverskolora ciferplato
7 kaj 14 kilocikloj po komutatoro
Luma akord-indikilo
Duobla toneco - Elektro-dinamo
Grandmodela laŭtparolilo, haviganta
nelkompareblan muzikecon, kiu igas ĉiun
modelon ĉara radio-aparato de muzikamantoj

PREZO : 2.035 FR.

10 % -a rabato por N.E.-abonantoj

Anciens Etablissements

Lavoix & Renouard

49ter, Rue d'Arras - DOUAI

ESPERANTO - ĈAMPANO

Grand 1^o cru - Unua Vinberregiono
Klasigita en 100 % kategorio

Laŭ gusto : Dolĉa ; Duondolĉa ; Maldolĉa
Prezoj en flams :

Carte verte (verda kapuĉo) po botalo, 10. fr. flk

Mendu al samideano

R. CHANCE, 3, rue René-Bourgeois, REIMS (Francujo)

Pago al R. Chance, Mailly-Champagne (Marne)

Poŝtĉek-konto : Nancy 334-72

M. MAX TAILLEUR

Téléphone 603

16, Rue Gambetta
LENS (P.-de-C.)

Méthodes et Dictionnaires Esperanto

Librairie BRUNET

32, RUE GAMBETTA, ARRAS

Téléphone 61 - Ch. Pr. Paris 177-87

Liste de Livres sur demande, contre un timbre de 0 fr. 50

EXPORT

BRAUNIA

Buvez les bonnes Bières
de la Brasserie CARLIER

11, rue Félix-Faure, COUDEKERQUE-BRANCHE

B. C. 808 - Tél. 570 Dunkerque

*Elles sont livrées partout et chez tous
en fûts et en bouteilles*

BOCK LUXE

BOCK IDEAL

Hôtel-Pension "EOLE"

Madame PESSEY

158, 159, 160, Digue de Mer

MALO-LES-BAINS (Nord)

Téléphone 13,25

Vue magnifique sur la mer

TOUT CONFORT - PRIX MODÉRÉS

*Reduction 5% aux Esperantistes
Esperanto parolata*

De la mi-juillet au 31 août, séjour à l'hôtel
du professeur hollandais THIEN

PORTO VASMONTÉ

H. DE VASCONCELLOS, O. PORTO

Agent général : C. DOLPHENS

39, rue Gustave Jonquet, à LILLE

Tout le confort

Petits déjeuners

HOTEL DU GLOBE

59 bis, Rue de Lanery - PARIS (10^e)

entre la Gare de l'Est et la Place de la République

Métro : Lanery

Tél. Botzaris 42-37

Esperanto-Literaturo

je originala prezo

Liveras al vi :

ESPERANTO
BAUDIMONT-ARRAS